



tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



Nova rubriko: Rekte el la estraro

**Intervujo kun
la nova TT-
redaktisto**

**IJK 2010
okazos
en Kubo**

**TEJO serĉas
novan
volontulon**



Saluton!

Do jen la lasta numero sub mia redaktado. Ĝi bonŝance iĝis sufiĉe diverseca: Krom du intervjuoj kaj interesa raporto pri la landaj sekcioj de TEJO, estas nova rubriko “Rekte el la estraro”. Aldone, la rubriko “Esperanto en Interreto” reven-

is per tri kontribuoj.

Bonvolu atenti la ĉi-dekstran alvokon al kandidatiĝo kiel TEJO-volontulo. Notu, ke la limdato por kandidatiĝoj estas je la 16-a de Julio, do verŝajne nur mallonge post via ricevo de ĉi tiu numero (espereble ne antaŭ la ricevo).

Mi dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis al ĉi tiu gazeto dum mi redaktis ĝin, kaj esperas ke daŭre alvenados multaj kontribuoj sub la redaktisteco de Nicola RUGGIERO, mia posteulo.

Marcos

Enhavo

TEJO serĉas volontulon	3-4
Nova Koresponda Servo	4
Rubriko “Esperanto en Interreto”	4-5
Intervjuo kun la portempa	
TEJO-volontulo Paŭlo EBERMANN	6-7
Intervjuo kun la nova TT-redaktisto	
Nicola RUGGIERO	7-8
IJK 2010 en Kubo	9
Somera Esperanto-Kurskunveno	
de KEJ	9
Kompleta Demandaro por	
Esperantaj Junularaj Organizoj	10-14
270 muzikaj albumoj	
en Esperanto	14
Kontakt-informoj kaj	
informoj pri TEJO	15
Nova rubriko “Rekte el la estraro”	16

Limdato por 2009:5 – 15-a de Septembro 2009!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Nicola Ruggiero), c/o Siru Laine Hatun 9, 105 Reykjavík, Islando. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

Redaktisto: **Nicola RUGGIERO** (Islando). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: officejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

TEJO serĉas voluntulon!

TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 10-18 monatoj (pli aŭ malpli longa daŭro escept-okaze ankaŭ eblas, ni preferas almenaŭ tutan jaron) ekde tiam, kiam la periodo de voluntulado de la nuna TEJO-volontulo Paŭlo Ebermann finiĝos, do ekde Septembro 2009 (preciza dato laŭ interkonsento). La limdato por kandidatiĝi estas ĵaŭdo, la 16-a de Julio 2009 (alventempo de retmesaĝo aŭ paperletero, ne sendodato). Ni bonvenigas ĉiujn kandidatojn prezenti sin dum IJK (18a ĝis 25a de Julio, Liberec, Ĉeĥio). Tamen, ĉeesto dum la IJK ne estas kondiĉo.

TEJO strebas al tio, ke konstante estu TEJO-volontulo en Centra Oficejo, kiu povu dediĉi cent elcentojn de sia labor-tempo al TEJO. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de TEJO, sed samtempe signifas spertan pliriĉiĝon ne nur personan, sed ankaŭ movadan. La estraro limigas la daŭron de voluntulado al proksimume unu jaro, tiel ebligante al multaj akiri tiujn spertojn. Kiel volontulo vi certe lernos memstare labori kaj povas profundigi viajn spertojn en la sube menciitajn taskojn, se viaj spertoj estas bazaj.

La TEJO-volontulo ankaŭ dum kongresoj (IJK kaj UK) kaj TEJO-seminarioj estu la "vizaĝo" de la organizo, informante al membroj kaj aliaj interesatoj pri

agado, aranĝoj, servoj ktp de TEJO.

La TEJO-volontulo laŭeble:

- havu tre bonan scipovon de Esperanto (legan, skriban kaj parolan)
- scipovu la anglan; scipovo de aliaj lingvoj estos pozitive konsiderata
- ŝatu administran laboron
- estu sperta pri komputil-uzado (retpoŝto, Interreto, tekstprilaborado, ktp)
- havu profundajn konojn de la junulara Esperanto-movado
- estu kapabla memstare preni decidojn
- estu preta aktive kunlabori kun la estraro de TEJO rilate al la ĝenerala funkciado de la organizo
- havu konojn de la eŭropaj junularaj strukturoj kaj eŭropaj instancoj

La laboro konsistas el:

- pritraktado de la poŝtaĵoj (paperaj kaj retaj) de TEJO
- prizorgado de la TEJO-arĥivo
- administrado kaj prizorgado de kontaktoj kun eŭropaj kaj neeŭropaj strukturoj kaj organizoj
- aktiva subtenado de la agado de la estraranoj kaj komisiitoj de TEJO
- aktiva kunlaborado en la verkado de subvencipetoj
- aktiva kunlaborado en la aktualigo de la retpaĝoj de TEJO

La volontulo ricevas senpagan ĉambron en la CO kaj poŝmonon (nuntempe 115 eŭroj semajne), kiu sufiĉas por vivteni sin.

Kandidatoj sendu paperpoŝte al la

Centra Oficejo aŭ retpoŝte al kaj
oficejo@tejo.org kaj ĝen-sek@tejo.org la
jenajn dokumentojn esperantlingve:

- vivresumon (priskribantan viajn studojn, kursojn, spertojn ktp)
- motivigan leteron (priskribantan kial vi volas volontuli por TEJO)
- laŭeble pruvilojn de la supre postulataj kapabloj
- laŭeble rekomendleteron de ekzemple landa Esperanto-organizo.

Grave:

La volontulo devas esti individua membro de TEJO. Momente TEJO-volontulo devas daŭre labori en la Centra Oficejo en Roterdamo. Nunaj kondiĉoj en Nederlando ne permesas al TEJO akiri labor- aŭ restad-permeson por necivitanoj de Eŭropa Unio. Tial la kandidato devas mem havi rajton laŭleĝe restadi dum la necesa periodo sur la teritorio de Nederlando.

Nova Koresponda Servo - kun fotoj!

Ekfunkciis nova internacia esperantista koresponda servo kun la nomo "Koresponda Servo Universala, KSU".

La Servon iniciatis Viktor KUDRJAVCEV, redaktisto de la revuo "Komencanto". La servo facilas por uzo kaj preskaŭ ĉiuj korespond-anoncoj kunhavas fotojn!

Adreso de la servo:

esperanto-plus.ru/koresponda-servo

Estimataj samideanoj, bonvolu uzi la servon mem kaj rekomendi ĝin al viaj

konatoj, instruistoj, kursgvidantoj, komencantoj ktp.

Krom plumamikajn "Koresponda Servo Universala" akceptas ankaŭ alispecajn anoncojn kaj informojn!

Dum la unuaj du monatoj "Koresponda Servo Universala" jam havis pli ol cent korespondanoncojn el la tuta mondo!

Viktor KUDRJAVCEV

Laŭ Ret-Info

Rubriko Esperanto en Interreto

Jen tri kontribuoj al la rubriko "Esperanto en Interreto". Kontribuu mem al ĝi per interesa interreta Esperantaĵo!

UEA en Interreto

UEA lanĉis novajn servojn en Interreto. Meze de Majo aperis la unua numero de "UEA viva", 10-minuta filmĵurnalo kun

raportetoj pri aktualaĵoj en UEA, TEJO kaj la Centra Oficejo (CO), pri novaj libroj, ktp. Jam aperis du numeroj. En la dua eldono de UEA viva troviĝas ankaŭ peco pri antaŭaj kaj nunaj TEJO-volontuloj.

Iom pli frue ekfunkciis reta kinejo, kie eblas jam spekti programerojn de la aprila

Malferma Tago de la CO kaj historiajn dokumentojn pri la unua IJK en 1938 kaj pri IJK kaj UK en 1959. Iom post iom oni aldonos aliajn filmojn.

- "UEA viva" troviĝas en

[youtube.com/UEAviva](https://www.youtube.com/UEAviva)

- La reta kinejo troviĝas en

ipernity.com/doc/97850/home/video

La aperritmo de numeroj de "UEA viva" kaj de novaj filmoj en la reta kinejo dependos de ilia populareco. Mi invitas vin regule rigardi ilin kaj diskonigi ilin! Oni povas finance subteni la produktadon de tiuj novaj servoj per donaco al la konto "video" ĉe UEA. Koran dankon!

Osmo BULLER

Ĝenerala direktoro de UEA

Podkasto.net


Jam de tri jaroj elsendas podkasto de Varsovia Vento. Kiel ĉiu projekto, tiu reta radio daŭre evoluas. Aŭskultantoj certe rimarkis, ke lastatempe la elsendoj estas preparataj en formo de pli praktikaj, ĉirkaŭ duonhoraj pecoj. Tamen plej granda ŝanĝo okazis antaŭ kelkaj semajnoj. Nome aperis nova paĝaro dediĉita nur al la podkasto. Ĝi estas kreita pere de WordPress. Krom la plej aktualaj elsendoj troveblas tie interalie arĥivejo kun plej interesaj pecoj de malnovaj elsendoj, anoncoj kaj informoj pri la redakcio. Sed prefere kontrolu mem ĉe podkasto.net.

Prikomputila blogo en Esperanto

E@I havas novan blogon¹ ĉe blog.ikso.net, kies celo estas liveri interesajn novaĵojn pri la komputilaj aferoj en Esperanto. La blogo celas vastigi fakan uzon de Esperanto rilate al

komputiloj kaj modernaj teknologioj ĝenerale (interreto, programaro, grafik-aĵoj, ...). Nur se lingvo estas vere uzata en ĉiuj eblaj vivosferoj, ĝi povas montri sian efikecon kaj taŭgecon.

Eblus diri, ke aldona celo de la retejo estas iom eduki publikon ankaŭ pri faka terminologio (ofte malĝuste uzata fare de la ĝenerala esperantistaro). Kaj krome, estas certe utile kunigi homojn kun samaj aŭ similaj interesoj ĉirkaŭ iu specifa projekto aŭ celo; do por komputilemaj kaj ĝenerale scivolemaj homoj pri modernaj teknologioj ekestis bona „nesto“ por kunlaboro.



La E@I-teamo bonvenigas komputil-emajn verkemajn kunlaborantojn, kun bona lingvo-kono por kontribui al la paĝaro per interesa enhavo. Okaze de interesiĝo skribu al peter.balaz@ikso.net aŭ al jevgenij.gaus@ikso.net.

La paĝar-adreso estas: blog.ikso.net

Rimarko: www.ikso.net estas oficiala retejo de E@I

Peter BALAZ

PS: estas preparataj ankoraŭ kelkaj specifaj projektoj pri specifaj temoj/fakoj – nome instru- kaj helpo-paĝo pri kreado de blogoj kaj paĝaroj kaj retejo pri filmoj kaj subtekstigado.

¹ blogo – interreta taglibro aŭ taglibreca ĵurnalo

Intervjuo kun la portempa TEJO-volontulo Paŭlo EBERMANN

- Saluton Paŭlo! Rakontu iom pri vi mem!

Mi estas Paŭlo Ebermann, ĝis nun loĝinta en Berlino (Germanujo), kaj studento de matematiko. Mian studon mi jam preskaŭ finis, mankas nur unu ekzameno (pri iu prelego, kiun mi aŭskultis antaŭ kelkaj jaroj) kaj la diploma laboraĵo, do mi principe povas facile liberigi tempon por volontuli en Roterdamo.

- Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?

Meze de 2001 kunstudantino de mi (kiu tuthazarde nuntempe estas ĝenerala sekretario de TEJO) en iu leciono subskribigis homojn sur iu papero en listo pri "simbola membreco de Germana Esperanto-Junularo". La plej multaj enskribantoj verŝajne pensis, ke temas pri la enskriblisto por la prelego ...

Sed mi fakte vere interesiĝis, kaj eĉ faris iujn demandojn al Anna-Laura. Duonan jaron poste, nome la 27an de decembro 2001 mi ricevis leteron de la Germana Esperanto-Junularo kun "informpakaĵo" pri Esperanto. Nu, la enhavo tiom entuziasmigis min, ke mi jam la sekvan matenon elŝutis kurson el la Interreto (tiun brazilan "Kurso de Esperanto") kaj eklernis per ĝi.

Post kelkaj semajnoj mi komencis regule viziti nian lokan grupon kaj tiel plibonigis miajn lingvosciojn.

- Ĉu vi jam antaŭe aktivis en la Esperanto-movado? Se jes, kiel?

Mi fakte relative frue komencis aktiviĝi en Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Mia unua tasko estis kreado de reĉpoŝta (germanlingva) mentorprogramo por la



komputila kurso, per kiu mi mem lernis. Baldaŭ mi ankaŭ helpis en la oficejo (kaj sufiĉe rapide ricevis la titolon "Afergvidanto"), en la interreta komisiono, kaj en KKRen (la organiza teamo de IS).

Mi estas estrarano de Esperanto-Junularo Berlino kaj Esperanto-Junularo Brandenburgio-Berlino, kaj ekde 2005 ankaŭ estrarano de GEJ.

- Kial vi decidis volontuli en la Centra Oficejo?

Tiu parto estas verŝajne iom nekutima ... La 8an de majo mi vespere ricevis telefonalvokon de Gregor (nia prezidanto), ke oni bezonas novan volontulon, ĉar Federico pro personaj kialoj volas ĉesi.

Mi la sekvan tagmezon diris (post konsiliĝoj kun du antaŭaj volontuloj, du

estraranoj kaj iuj privataj proksimuloj)
"Jes", ĉar mi

a) volas helpi al TEJO,

b) ŝatas Esperanton, kaj povos tie vivi
tute en Esperanta medio (nu, krom la
aĉetumado),

c) havos ĉi tie (ekster miaj labortempoj)
sufiĉan tempon kaj trankvilon por labori
pri mia diploma tezo,

ĉ) tiel jam povas kolekti iom da
eksterlanda sperto, kiu verŝajne helpas al
mi poste, serĉante laboron,

d) nun estos pagota por veturi al la
gravaj someraj Esperanto-renkontiĝoj,
anstataŭ devi pagi :-p

Kaj nun, la 18an de majo mi alvenis en
Rotterdam, kaj la 19an eklaboris.

- *Kion vi volas fari por TEJO?*

Unue la kutimajn volontulajn taskojn:

- trakti retmesaĝojn

- trakti paperpoŝton

- esti atingebla

- subteni la estraron

Krome necesas/indas ordigi la arĥivon,
ŝajne. Kaj se poste restos tempo, mi
dediĉos ĝin al helpado pri organizado de
IJK, kaj simile. Nu, aliaj taskoj facile
trovoblos.

- *Kiaj estas viaj ĝisnunaj impresoj pri la
TEJO-laboro, la Centra Oficejo ĝenerale,
viaj kolegoj, la oficeja etoso kaj la vivo
en Roterdamo?*

Sufiĉe pozitivaj. La loĝado estas iom
modesta, sed oni ne atendu luksan
loĝejon tie ...

La kolegoj estas simpatiaj – dufoje tage
estas kafopaŭzo, kiam oni kunsidas kaj
babilas, kaj tio verŝajne tre helpas al la
etoso ĝenerala.

La vivo en Roterdamo ... je mia alveno
estis farita eta festo kun kradrostado (kun
Tobiasz, Federico, kaj du germanaj
amikoj de Fede). Do, tute
nenederlanda :-)

- *Ĉu vi volas lerni la nederlandan
lingvon vivante nun en Nederlando?*

Mi hodiaŭ en la tagmeza paŭzo iom
ĉirkaŭiris por aĉetumi, kaj tie rimarkis la
problemon pri ne-sciado de la nederlanda.

Kompreni ĝin funkcias mirinde bone
(mi estas germano, kaj ekzistas germanaj
dialektoj malpli facile kompreneblaj), sed
mi ne povas diri ion ajn. Mi do verŝajne
lernos almenaŭ kelkajn gravajn frazojn.
Sed mi tute ne venis ĉi tien por lerni la
Nederlandan.

Intervjuo kun Nicola RUGGIERO – la sekva redaktisto de TT

- *Saluton – kaj gratulojn pro via elektiĝo
kiel redaktisto de TT! Rakontu iom pri via
deveno kaj nuna loĝloko.*

Mi naskiĝis en Mola di Bari, suda Italujo,
la 22an de Januaro 1986; tie mi kreskis
kaj vivis sed ekde la fino de Aŭgusto
2008 mi loĝas en Islando por esti pli

proksime al mia koramikino.

- *Interese. Kio estas via vivokupo?*

Se diri malsuke, mi nuntempe laboretas
en trinkejo de Rejkjaviko; sed se diri
suke, mi strebas analizi la mis-teron en
kiu mi loĝas. Alivorte, mi provas
kompreni kion mi vivas kaj vortumas ĝin



en poemojn.

- *Al analizado de landoj certe apartenas ankaŭ lernado de lingvo, ĉu ne? Kiujn lingvojn vi scipovas aŭ lernas?*

Krom mia dialekto kaj la itala, mi parolas sufiĉe bone Esperanton. Antaŭ ol veni en Islandon mi kredis esti kapabla paroleti ankaŭ en la angla, sed montriĝis tuj ke mi povis diskuti pri Coleridge sed ne diri "mi malsatas" pro iel stulta lingvoinstruado en Italujo. Nun mi tre plibonigis mian anglan per legado de gazetoj en la reto kaj de furorvenditaj libroj de Dan Brown. Nuntempe mi kompreneble lernas la islandan esence danke al islandaj esperantistoj: Þórey (thoŭrej) Kolbeyns, la edzino de Baldur Ragnarsson, instruis al mi la bazon kaj pruntedonis infanlibrojn

por legado.

- *Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?*

Vi rajtas ridi: mi eklernetis 11-jaraĝe Esperanton kiam mi avide legis sekcion pri ĝi en *Disney*-manlibro por infanoj. Sed mi serioze lernis ĝin per reta kurso en 2000 kaj ekde tiam mi ankaŭ movadumas

- *Rakontu iom pri via Esperanta vivo kaj agado!*

Mi partoprenis mian unuan aranĝon en 2002, ĝi estis la Internacia Junulara Festivalo en Fenestrelle, en norda Italujo. Tiam mi konatiĝis kun la estraro de IEJ (Itala Esperantista Junularo) kaj mi ekŝatis la ideon movadumi kaj mi proponis min disponebla por ajnaj taskoj. Post kelkaj monatoj, oni proponis al mi ekredakti la junularan sekcion de la nacia revuo kaj tion mi faris ĝis decembro 2008. Sendube interesa sperto kiun mi volonte transdonis al kuraĝa kaj entuziasma junulo, Francesco LORENZON.

En 2003 mi eniris la estraron de IEJ kiel simpla estrarano; komence mi ofte nur aŭskultis por lerni kiel funkcias la aparato kaj iom post iom mi surprenis aliajn respondecojn. En Pasko 2006 mi iĝis prezidanto de IEJ ĝis pasko 2008. Mi estas sufiĉe kontenta pri tiu periodo ĉar la ĉefaranĝo de IEJ, t.e. IJF, finfine normale atingis la minimuman kvanton de 100 partoprenintoj sufiĉe feliĉaj je la malpliigo da fuŝoj.

- *Ĉu vi ankaŭ faris iun alian volontulan laboron, ne ligitan al Esperanto?*

Mi dum kelkaj jaroj aktivis politike en la verdula partio kaj en volontulaj asocioj por la naturprotektado.

- *Mi dankas vin pro la intervjuo!*

IJK 2010 en Kubo

La Estraro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kun ĝojo anoncas kaj informas, ke ĝi venis al la decido ke la 66-a Internacia Junulara Kongreso, IJK 2010 okazu en Los Cocos, Santa Cruz del Norte, Kubo (proksime al la ĉefurbo Havano).

Post longa kaj serioza diskutado pri ĉiuj alvenintaj kandidatiĝoj, esperantistoj el Kubo montris la plej taŭgajn kondiĉojn. IJK okazos de la 24-a ĝis la 31-a de Julio en 2010, tuj post la UK, kiu okazos en Havano, la ĉefurbo de Kubo. Pliajn informojn pri la 66-a IJK la TEJO-estraro donos dum la venontaj monatoj.



Situo de Santa Cruz del Norte en Kubo

Federico, TEJO-volontulo

Somera Esperanto-Kurskunveno de KEJ

De la 21-a ĝis la 23-a de aŭgusto 2009 okazos la *Somera Esperanto-Kurskunveno de KEJ* en Koreujo. Ĝin organizas la Korea Esperanto-Junularo (KEJ). Oni atendas 40 aŭ pli da partoprenantoj.

Ĉi-jare ĝi okazos kunlabore kun la Esperanto-rondo de la universitato Yonsei (universitata tereno Wonju), kio montras plifirmigantajn rilatojn inter KEJ kaj universitataj Esperanto-rondoj. Des pli ĝoje, la partoprenkotizo relative malmulte kostas, danke al koreaj patronoj kaj aŭspicio de la universitato Yonsei.

Programeroj (provizoraj) :

- Kursoj de Esperanto (baznivela kaj meznivela)

- Prelego pri historio kaj kulturo de Esperantujo
- Bankedoj
- Ekskurso
- Lerni sportodancon de la universitato Yonsei
- ktp (aldoniĝos pli da programeroj)

Aliĝo: Sendu viajn nomon, aĝon, sekson, Esperanto-nivelon, kaj aliajn aferojn bezonatajn por vi, al gloro@saluton.net

Song Ho-young

Prezidanto de Korea Esperanto-Junularo
Komitatano A kaj Azia komisiito de TEJO

Superrigardo KODEJO

Enkonduko

Fine de la pasinta jaro, TEJO lanĉis demandaron al siaj landaj sekcioj kaj aliaj junularaj organizoj.

Ĝi nomiĝas KODEJO (Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizaĵoj) kaj ĝi estas nova versio ĝisdatigita surbaze de malnova demandaro nomata ALSTOM (Agado de Landaj Sekcioj en TejO-Mondo). Pere de ĝi ni celis kolekti gravajn informojn de la junularaj organizaĵoj de nia movado.

Ĝi celas kolekti unue la informojn, kiuj ĉiam devas esti ĝisdataj por nia datumbazo kaj por la jarlibro de UEA, kiel aktuala estraro, aktualaj kontaktinformoj, ktp. Due, ĉar ĝi donos aliajn interesajn informojn, kiuj ebligas al ni havi superrigardon pri la funkciado de niaj landaj sekcioj, i.a. pri la kotizsistemo, pri estrar-periodo kaj la rilato kun siaj nejunularaj tegmentaj organizaĵoj.

La demandaro estis kreita per "Google Docs" kaj estis alirebla per reto en la retpaĝo de TEJO. La reprezentantoj de la junularaj organizaĵoj povis ĝin plenigi, kaj respondoj tuj eniris nian datumbazon. Al tiuj asocioj, kiuj ne posedis validan retadreson, ni sendis paperan kopion de la demandaro.

Respondoj


El niaj 45 landaj sekcioj (LS-oj), nur 19 plenigis la demandaron. Per tiu ĉi unua datumo, oni povas atesti ke ja multaj landaj sekcioj malaktivis. El tiuj, kiuj respondis, pri la stato de sia organizaĵo, la respondoj estis jenaj:

- dekunu aktivaj (ĈEJ, SKEJ, IEJ, PEJ, GEJ, JEBUO, JEFO, BEJO, NJE, JEJ, FLEJA)

- unu dormanta (FEJO)

- sep vekiĝantaj (KEJ, JOTE, IREJO, NEJ, KEJA, JEB, JELI)

Stato de via organizaĵo



Respondis jenaj LS-oj:

- Pola Esperanto-Junularo (PEJ)
- Germana Esperanto-Junularo (GEJ)
- Junulara Esperantista Burundia Organizaĵo (JEBUO)
- Korea Esperanto-Junularo (KEJ)
- Junulara Organizaĵo de Togolandaj Esperantistoj (JOTE)
- Junulara Esperantista Franca Organizaĵo (JEFO)
- Irana Esperantista Junulara Organizaĵo (IREJO)
- Brazilia Esperantista Junulara Organizaĵo (BEJO)
- Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ)
- Kroatia Esperanto-Junulara Asocio (KEJA)
- Itala Esperantista Junularo (IEJ)
- Norvega junularo esperantista (NJE)

- *Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ)*
- *Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ)*
- *Japana Esperanto-Junularo (JEJ)*
- *Flandra Esperantista Junulara Organizo (FLEJA)*
- *Junulara Esperanto-ligo Israela (JELI)*
- *Junularo Esperantista Brita (JEB)*
- *Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO)*

Oni povas konsideri ke la aliaj dudekses, kiuj ne respondis estas en dormanta aŭ eĉ mortanta stato. Kvankam malpli ol duono de niaj LS-oj respondis al KODEJO, mi taksas la nombron kiel sufiĉan konsiderante ke estis la unua fojo, en kiu KODEJO aperis, kaj ke tio estas komenco de laboro kiu celas aktivigi niajn LS-ojn, kiuj estas en malaktiva stato, kvankam tio precipe dependas de la lokaj fortoj. Ni esperas ke fine de 2009 pli multaj respondos la demandaron.

Membraro

La membraro de niaj LS-oj tre varias. Plejofte ili ne trapasas kelkdekojn da membroj. Vekiĝantaj asocioj kiel IREJO kaj KEJ ne atingas 20 membrojn, dum membraro de BEJO kaj PEJ ĉirkaŭas cent. Escepto estas GEJ, kiu kalkulas je proksimume 250 kotizantaj membroj.

Rimarkblas ke JEBUO, kiu ĵus pasintjare estis akceptita kiel LS havas unu el plej grandaj membraroj: 123, kiuj estas la junaj membroj de sia landa asocio. Tio konfirmas la lastatempan vigecon de la movado en Burundo, eta lando en Afriko.

Kvankam plej multaj (dek unu) deklaras ke ĝiaj membroj pagas kotizon, ne restis klare ĉu por la cetero (ok), kies

membroj estis deklaritaj kiel aligitaj kaj alispecaj, la aliĝo estas ja senpaga. Verŝajne ne, ĉar ĉe la demando pri kiom foje ĝiaj membroj kotizas, deksep LS-oj respondis ke ĝiaj membroj kotizas 1-foje jare, kaj nur ĉe du membreco estas sen kotizo (JELI, JEB). Tiu demando ja evidentiĝis ne tre preciza, kaj estas unu el plibonigendaj eroj por ĉi-jara demandaro.

Estrarperiodo

Plejmulte el niaj LS-oj elektas novan estraron ĉiujare (IEJ, FEJO, JEB, ĈEJ, JEFO, FLEJ, NEJ, KEJ, JELI, KEJA). Tio eble estas garantio ke ĉiam freŝaj homoj gvidas la organizojn, ĉar multo povas ŝanĝiĝi en vivo de junuloj de unu jaro al alia, tiel ke ili ne povas longe estri asociojn. JOTE, PEJ, GEJ, BEJO, NJE, SKEJ, IREJO elektas novan estraron ĉiun duan jaron.

Escepto estas nur JEBUO, kies estrarperiodo daŭras tri jaroj.


Male al tio, kion ni supozis antaŭe, ne estas iu pinta monato preferata, en kiu la LS-oj elektas novan estraron. Ĉiumonate krom Aŭguste okazas elekto en niaj LS-oj. Januare - GEJ, PEJ, JEBUO, Februare - KEJA, KEJ, FEJO, Marte - FLEJA, Aprile - JEB, IEJ, IREJO, Maje - SKEJ, Junie - NJE, Julie - BEJO, Septembre - JEFO, NEJ, Oktobre - ĈEJ, Novembre - IEJ, Decembre - JELI, JOTE.

Informiloj

El tiuj LS-oj, kiuj respondis nian demandaron, kvar (JEBUO, JOTE, KEJA, JELI) ne havas iun oficialan informilon por liveri al siaj membroj. El la dek ses ceteraj, naŭ eldonas paperajn informilojn (KEJ, JEFO, IREJO, BEJO,

NEJ, IEJ, FLEJA, FEJO, PEJ), tri eldonas ambaŭ paperajn kaj elektronikajn informilojn (GEJ, IEJ, NJE) kaj aliaj tri nur informas la membrojn elektronike (SKEJ, JEB ĈEJ).

Aperritmo



La supra grafikaĵo montras la aperitmon, laŭ kiu LS-oj eldonas siajn oficialajn informilojn.


Sep LS-oj eldonas siajn informilojn en ne tre regula aperitmo (SKEJ, JEBUO, JOTE, NEJ, KEJA, JELI, JEB) sed preskaŭ sama kvanto (ses) eldonas ilin pli ol kvarfoje jare (ĈEJ, KEJ, PEJ, KEJ, NJE, JEJ), kaj tio estas tre bona informo, ĉar tio signas ke teni siajn membrojn informitajn kaj liveri periodaĵon ankoraŭ estas grava por niaj LS-oj.

Ankoraŭ GEJ, JEFO kaj IREJO aperigas ilin tri- ĝis kvarfoje jare kaj FEJO, BEJO kaj FLEJA inter unu- kaj dufoje jare.

Strukturo kaj rilatoj kun tegmentaj organizoj

Dekdu el niaj landaj sekcioj estas junularaj sekcioj de nejunularaj organizoj (BEJO, IEJ, IREJO, JELI, JOTE, KEJ, GEJ, PEJ, JEBUO, NJE, FLEJA, JEFO). Ses estas sendependaj organizoj kun jura personeco (NEJ, ĈEJ, KEJ, SKEJ, JEJ,

FEJO) kaj unu estas sendependa organizo sen jura personeco (JEB).



Kiam demanditaj pri la rilato, kiun ili havas kun siaj patraj aŭ maljunularaj organizoj ili respondis ke rilatoj estas:

Malbonegaj 0, malbonaj 1 (JOTE), sufiĉe bonaj 3 (IREJO, KEJA, FEJO), bonaj 10 (IEJ, JELI, GEJ, PEJ, BEJO, NEJ, FLEJA, JEFO, ĈEJ, NJE), bonegaj 5 (KEJ, JEBUO, SKEJ, JEJ, JEB)

Nur unu LS-o (JOTE) asertas havi malbonan rilaton kun sia patra asocio pro kontraŭstaraj sintenoj.

Por la aliaj, la kialo por tiuj “ne bona rilato”, estas la manko da komunikado (BEJO, KEJA) aŭ manko da komunaj intereso (FEJO) kaj unu (NJE) asertis: “maljunuloj agas maljunege :)”. Tamen ĝenerale montriĝas ke tiuj pli aktivaj LS-oj havas bonajn rilatojn kun siaj tegmentaj asocioj aŭ kun la nejunularaj organizoj en siaj landoj.

Interna Komunikado

El tiuj LS-oj, deksep havas retan diskutliston por la membroj (ĝi mankas al JOTE, JEBUO kaj KEJA) sed nur dekdu havas diskutliston por la estraro (ĝi mankas al FEJO, JELI, ĈEJ, NEJ, SKEJ,

JOTE, KEJA kaj JEBUO). La estraro de naŭ asocioj kunvenas neregule per la reto (IREJO, IEJ, PEJ, JEFO, KEJ, FEJO, ĈEJ, SKEJ) sed ankaŭ naŭ aliaj ankoraŭ neniam rete kunvenis ĝis kiam ili plenigis la demandaron (GEJ, NJE, FLEJA, JEJ, JELI, NEJ, JOTE, KEJA, JEBUO). Nur du kunvenas ĉiumonate per la reto (BEJO, JEB).

Ŝajne la fizikaj kunvenoj de la estraro estas pli preferataj ol la retaj por kelkaj asocioj. Naŭ organizoj kunvenas pli ol dufoje jare (IEJ, PEJ, JEFO, KEJ, GEJ, FLEJA, JEJ, NEJ, JOTE) kaj ses kunvenas unufoje jare (BEJO, JEB, FEJO, ĈEJ, SKEJ, JEBUO). Du aliaj renkontiĝas dufoje jare (IREJO, KEJA), kaj lastaj du ne kunvenas eĉ unu fojon jare (JELI, NJE).

Renkontiĝoj kaj kongresoj

Por multaj LS-oj la organizado de renkontiĝo estas la ĉefa aktivaĵo dum la tuta jaro. La plejmulto el niaj LS-oj okupiĝas pri organizado de landaj kunvenoj, kiuj ankaŭ ofte estas internaciaj. GEJ kaj PEJ ĝis nun organizis siajn proprajn jarfinajn renkontiĝojn, nome IS kaj AS, sed ekde ĉi tiu jaro oni kune organizos JES-n. Ankaŭ KEJ kaj JEJ alterne kun Ĉina junularo, organizas jarfinan Komunan Seminarion. ĈEJ pasintjare organizis trejnseminaron, kaj ĉi-jare organizos IJK-n kune kun GEJ kaj PEJ. Gratulinda kunlaboro.

JEFO, GEJ, KEJA, FLEJA, IEJ, FEJO, NEJ, NJE kaj SKEJ organizas ofte siajn proprajn renkontiĝojn. BEJO, JOTE organizas landajn junularajn kongresojn. JELI, JEBUO kaj JEB havas neformalajn renkontiĝojn dum la jaro.

Nur IREJO ankoraŭ ne organizas siajn proprajn renkontiĝojn. Espereble baldaŭ ankaŭ ili en Irano sukcesos kunveni.

Eksteraj rilatoj

GEJ rilatas kun Germana Junulara Organizo kaj la Germana Ministerio por familioj, virinoj junularo kaj pensiuloj. PEJ kreas rilatojn dum la organizado de Ago-Semajno kaj foje eĉ sukcesas subvenciadon por ĝi. IEJ, havas rilaton kun Ministerio pri Aferoj Eksterlandaj tiel ke kelkaj italoj kaj eksterlandanoj povas ricevi partan repagon de vojaĝ-kostoj.

Simile, en 2008 FEJO ricevis eksteran subvencion kaj per ĝi sendis du esperantistojn al IJF.

Krom SKEJ kaj ĈEJ, kiuj havas mapli praktikajn eksterajn rilatojn, ĉiuj ceteraj LS-oj ne havas ajnan rilaton kun aliaj organizoj. Kompreneblas ke malfacilas eĉ siajn proprajn internajn problemojn prizorgi, sed rompi la ŝelon, kunlabori kaj krei ligojn kun aliaj ne-esperantistaj organizoj estas tre konvena plupaŝo al kiu ĉiuj devas strebi.

Membro-varbado

Kvankam multaj LS-oj asertis tion, ni ne konsideras ke paroli pri Esperanto al amikoj kaj konatoj povas esti strategio por akiri novajn membrojn.

La plej ofta maniero per kiu la LS-oj varbas membrojn estas informado ĉe lernejoj, prelego pri Esperanto, partopreno en foiroj, disdonado de informiloj kaj varbado ĉe Esperanto-kursoj kaj renkontiĝoj. (ĈEJ, SKEJ, JEB, JOTE, FLEJA, JEB, KEJ, IEJ, PEJ, JEBUO)

Inter tiuj, menciindas interesaj strate-

gioj de KEJ: "Persvadi membrojn de KEA por ke ili registru siajn gefilojn en KEJ", kaj de ĈEJ, kiuj fojfoje kontaktiĝas kun nove registriĝintaj *lernu!*-uzantoj. Sed ankoraŭ kelkaj ne speciale aktivis sur tiu kampo (FEJO, IREJO, KEJA, NJE, JELI) dum aliaj ekplanis strategion (NEJ, BEJO).

Atingoj kaj problemoj

Ni petis ke niaj LS-oj raportu pri siaj atingoj, celoj kaj problemoj, kiujn ili havis en 2008.

Por ne tro ŝarĝi tiun ĉi superrigardon, ni afiŝis ĝin aparte en la TEJO-vikio: tejo.org/vikio/Atingoj_Kaj_Problemoj

Konkludoj

Ni kredas ke ĉi tiuj informoj povas helpi

niajn LS-ojn plifortiĝi en siaj agadoj kaj strategioj. Flanke de TEJO, estas multaj plibonigendaj eroj, kiuj bezonas iom pli da atento, ankaŭ ĉe teknika flanko. "Google Docs" verŝajne ne estas la plej bona rimedo. Mi havis multe da problemoj por kompili la rezultojn. Do, certe iu kun pli da informadika scio povas pli kontentige rekrei la demandaron per aliaj rimedoj.

Fine, sed ne malplej grave, ni dankas al ĉiuj paciencaj respondintoj. Nur danke al vi ni povis kolekti tiujn gravajn informojn por ke TEJO povu esti pli aktiva tegmenta asocio por junularaj organizoj tra la mondo.

Rogener PAVINSKI

Estrarano pri Landa Agado de TEJO

270 muzikaj albumoj en Esperanto

Dum la pasintaj 40 jaroj eldoniĝis almenaŭ 270 muzikalbumoj kun Esperanto-kantado. La statistiko montras daŭran kreskon: En la sesdekaj jaroj aperis ĉirkaŭ 4 albumoj, en la sepdekaj ĉirkaŭ 17, en la okdekaj ĉirkaŭ 58, en la naŭdekaj ĉirkaŭ 75 kaj en la unua jardeko de la 21-a jarcento ĝis proksimume decembro 2007 ĉirkaŭ 105 (dum 8 jaroj). Alimaniere dirite ekde 1977 ĉiujare eldoniĝis almenaŭ unu albumo, ekde 1987 almenaŭ kvar jare, ekde 1996 almenaŭ ok.

La maksimumon oni atingis en la jaro 2001, kiam aperis escepte multaj, nome 27 albumoj. Laŭ la kvanto sekvas 2004 kun 16 albumoj kaj 2000 kun 14. Ekde tiam okazis ioma malkresko al ĉ. 8 albumoj jare - plej verŝajne tio estis sekvo de la pli vasta uzado de mp3-formataj

dosieroj.

La eldonado bele montras la kreskon de Esperantujo dum tiuj jardekoj – jardekoj kun pli kaj pli grandaj kaj multaj junularaj kaj eksjunularaj renkontiĝoj, kun pli da denaskuloj kaj aranĝoj por ili, pli da Esperanto-aktivado en ekster-eŭropo, pli da scienca literaturo kaj, en la pasintaj jaroj, bela prezentiĝo de Esperanto en Interreto.

La liston de tiuj preskaŭ 300 muzikalbumoj mi metis al Vikipedio, ĉe eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-muzikalbumoj; aliaj korektis kaj aldonis. Ĉe kelkaj titoloj plu mankas iuj indikoj, aliaj titoloj eble entute mankas. La Vikipedio kaj ĉiu uzanto ĝojos pri via aldonado.

Lu WUNSCH-ROLSHOVEN

Laŭ Ret-Info

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044
Faksilo: (010) 436 1751,
Retadreso: uea@co.uea.org

Estraro de TEJO

• Gregor HINKER (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
Schelleingasse 54/24, 1040 Wien, Aŭstrujo
Retadreso: gregor@tejo.org

• Anna-Laura H. WICKSTRÖM (Ĝenerala Sekretario)
Militärstrasse 14, 8004 Zürich, Svisujo
Retadreso: anna-laura@tejo.org

• Vildana DELALIĆ (Seminarioj kaj aktivula trejnado)
A.B. Šimića 5, Sarajevo 71000, Bosnujo-Hercegovino
Retadreso: vildana.delalic@hotmail.com

• Sergej TYRIN (Kasisto)
P.O.K 15092, Be'er Ševa 84120, Israelo
Retadreso: interdist@gmail.com

• Rogener PAVINSKI (Landa agado)
Av. Lafaiete Costa Couto, 1447
Ribeirão Preto - SP - Brazilo - 14060-450
Retadreso: rogener@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon havi blogon ĉe tejo.org
- eblon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

Rekte el la estraro

Kion faras la TEJO-estraro? Ĉu ili pasigas IJK-n en kunsidaj ĉambroj por eviti la fortan someran sunon? Kaj kion ili faras kiam ne estas IJK? Atendas la venontan someron, preparantaj la komitatan kunsidon? Jen la ebleco ekscii pri la senfinaj temporabaj plezuroj de burokrataĵo, mastrumado de organizo, diskutoj kaj fojaj decidoj kiuj okazas en la estraro de via organizo:

Ni ĝojas prezenti al vi la komenco de nova rubriko: Rekte el la estraro!

Kiel vi certe jam rimarkis - eble umante en la reto aŭ sur la kovrilo de tiu ĉi gazeto – TEJO havas novan emblemon. Post pli ol jaro, diskutoj en ekstera komisiono kaj pluraj proponoj la estraro de TEJO elektis novan emblemon – ĉu stelo, ĉu aro da cirkloj, ĉu pensubloj, ĉu la *Michelin*-ulo, ... interpretoj multas, sed jen simbolo kiu ligas konatan tradician simbolon kun organika kaj dinamika prezentado; spegulo de nia 75-jaroj juna organizo. Baldaŭ aperos denove varbiloj, propraj membrokartoj ktp kun nia nova emblemo!

Sed ne nur aspekte okazis paŝoj an-

taŭen. Ankaŭ tehniko TEJO kunkuras kun la modernigo de nia ĉirkaŭa mondo. La komitato de TEJO – la motoro kaj decidinstanco de la organizo – ricevis retan voĉdonsistemon. Ĝis nun, la komitato nur dum komitatkunsidoj – kutime dum la IJK – povis voĉdoni kaj efektive enkonduki ŝanĝojn por TEJO. La konsekvenco estas ke foje la membroj devas atendi ĝis unu jaro por ŝanĝoj, kaj ke landaj sekcioj kiuj pro geografiaj aŭ financaj kialoj ne sendas komitatanon al la IJK ne persone povas kundecidi kaj voĉdoni dum la kunsidoj. Granda danko iras al Tom YUVAL, kiu verkis la sistemon. Kiam certiĝos ke ĉiu komitatano sukcesas uzi la sistemon, la komitato ĝin ekuzos.

Ankaŭ Pasporta Servo, nia kara servo, kiun Esperantistoj tra la tuta mondo jam dum pli ol 30 jaroj ĝuas, ricevis retan version. Pri pli da detaloj pri Pasporta Servo 2.0 vi povos legi en aparta artikolo en la venonta TT.

Dum belaj printempaj tagoj komence da Majo, la suno brilis – ie malantaŭ la nuboj kiuj verŝis sian pluvon sur ni – la estraro de TEJO kunsidis en la Centra Oficejo en Roterdamo por longaj diskutoj, meznoktaj kunsidoj, nederlandaj kuketoj kaj tro da komputiloj. Interalie ni elektis novan redaktiston por TT. Ni volas kore danki al Marcos CRAMER pro tre bela laboro kiel redaktisto kaj deziras al li ĉion bonan por siaj studoj kaj familio. Ni bonvenigas Nicola RUGGIERO kaj antaŭĝojas labori kun li.

Jen kelkaj el la projektoj de la estraro. En la venonta TT Gregor rakontos pli, kaj por la plej aktualaj informoj vizitu la estraran blogon ĉe tejo.org/en/blog/2747.



Estrarkunveno en Roterdamo